kaj en aliaj organizoj. La delegitoj ĉiam respektoplene atendas la opiniesprimon de la "granduloj", inter ili la usonanoj. Se ili ne konas Esperanton aŭ havas nur konfuzan ideon pri ĝi, gravaj ŝancoj perdiĝos. Estas nia tasko konigi Esperanton inter tiuj, kiuj reprezentos Usonon en internaciaj konferencoj oficialaj kaj privataj.

Kvankam la nombro de la Esperantistoj estas malgranda en Usono kompare al la eŭropaj landoj, EANA povus facile duobligi, triobligi kaj eĉ dekobligi sian membraron, se ĉiuj Esperantistoj en Usono aliĝus. Kial ne paroli kaj skribi pri tio al ĉiuj viaj gemikoj? "Amerika Esperantisto" (kies abonprezo estas nur unu dolaro poĵare) devus trovi multajn abonantojn en rondoj interesataj pri internaciaj problemoj. Kial ne diskonigi la gazeton kaj varbi abonantojn por ĝi? Kial ne pagi por abonoj, al bibliotekoj? Kial ne vendi ĝin en institutoj, konferencoj kaj kunvenoj, kie internaciaj problemoj estas diskutataj?

En la internacia Esperanto-movado Usono povos kaj devos ludi pli grandan rolon ol antaŭe. Ni esperu, ke la rivaleco inter IEL kaj UEA povos esti forigata kaj ke unuigita Esperanto-organizaĵo povos eluzi ĉiujn eblecojn por la diskonigo kaj uzo de Esperanto en la postmilita rekonstruo. Por ludi pli gravan rolon, EANA bezonos, laŭ la demokrata principo,

pli multajn membrojn. Jen do alia kaŭzo necesiganta varbadon de novaj membroj.

La fakaj movadoj ankaŭ estas tre gravaj. La instruistoj, kuracistoj, juristoj, laboristoj, katolikoj, protestantoj, judoj, rotarianoj, poŝtmarkkolektantoj ktp. restarigos siajn Esperanto-asociojn kaj republikigos siajn gazetojn. Ili bezonos membrojn, kunlaboron kaj financan subtenon el Usono. La Internacia Cseh-Instituto, la libro-eldonejoj, eble la semajna "Heroldo", rekomencos funkcii. Esperantistoj en ĉiuj landoj deziras korespondi kun usonanoj. Post iom da tempo uzo de Esperanto en internacia turismo necesigos kunlaboron de usonanoj. La ĉiujaraj Universalaj Esperanto-Kongresoj okazos denove.

Multaj eŭropanoj havas la strangan ideon, ke en Usono oni trovas la monon sur la strato kaj ke ĉiuj amerikanoj estas riĉuloj. Fakte nur malmultaj el la usonaj Esperantistoj estas efektive riĉaj. Tamen estas vere, ke kompare al la ekstrema malriĉeco reganta en kelkaj eŭropaj landoj, multaj usonaj Esperantistoj estas relative "riĉaj" kaj povos facile pliiĝi sian Esperantistan budĝeton je kelkaj dolaroj. Ili povos fariĝi Patronoj aŭ Membroj-Subtenantoj de internacia Esperanto-organizaĵo. Ili povos doni monon por helpo al la Familio Zamenhof kaj al aliaj Esperantistoj, kiuj suferas pro la cirkonstancoj. En kelkaj eŭropaj landoj ekzistas ankoraŭ grandaj



kvantoj da bonkvalitaj Esperanto-libroj. Ilia vendo havigos kapitalon por rekomenci Esperantogadon. Kial do ne fari la proponon, ke en Decembro, en la Tago de la Esperantista Libro, ĉiu amerika Esperantisto decidu elspezi dum la venonta jaro certan

sumon da mono — la plej altan sumon, kiu estas akordigebla kun lia financa situacio — por subteni la nacian, internacian kaj fakan Esperanto-movadon, aboni gazetojn, aĉeti librojn kaj helpi ĉiumaniere en la rekonstruo de nia movado en la tuta mondo?

## SOMERA KONFERENCO

### D-ro Cecil Stockard Vizitis Nov-Jorkon

PAULINE KNIGHT

La Prezidanto de EANA, D-ro Cecil Stockard, alvenis en Nov-Jorko la 20-an de Julio. Nia vigla Prezidanto tuj komencis sieron da konferencoj kun la Nov-Jorka esperantistaro. La 21-an de Julio, D-ro Stockard interkonsiliĝis kun la redaktistaro de la "AE" ĉe la Hotelo Nov-Jorkano. La ĉeestantoj estis D-ro Stockard, S-ro Connor, D-ro Solzbacher, D-ro Kao, S-ino Knight, S-ro Knight, S-ro Elsasser kaj S-ro Vathis. Estis ĝenerala interkonsento ke la "AE" estas la plej grava ligilo inter la Estra Komitato, la esperantistaro kaj la neesperantista mondo. Ĉiuj akordiĝis pri la tuja bezono por propagandiloj. Ankaŭ, laŭ interkonsento, mankas bona lernolibro al loge ilustrita kaj bindita. Por la gazeto "AE", estas necese akiri pagitajn reklamojn, korespond-

anoncojn, k.t.p. La disvolviĝo de la gazeto estas viv-grava al la esperanta movado, kaj pro tio la Estra Komitato invitas ĉiujn sendi sugestojn konstru-kapablajn.

La 25-an de Julio, D-ro Stockard partoprenis kunvenon ĉe la restoracio "Colucci". Inter tiuj kiuj esprimis ĝojon je la interkonatiĝo kun D-ro Stockard estis la jenaj reprezentantoj de kluboj: S-ro Naging de la Nov-Jorka Societo, S-ino Bortnick de la Klubo Harmonio, kaj S-ro Schatz de la Bruklina Klubo. S-ro Connor de la Esperanta Interlingva Asocio agadis kiel ĉefseĝulo. D-ro Stockard gratulis la Nov-Jorkajn grupojn pro ilia forta subteno por la movado kaj "AE". La kunveno fermiĝis kun tre interesa magia prezentado de D-ro Stockard, kiu je ĉi tiu kiel je aliaj okazoj montris ke li havas talenton eksterordinaran.

# TRIANGULO DE LA MORTO

W. SOLZBACHER

La freneza ideo venis al ni, ke ni povus preni tiun aeroplanon kaj forflugi al libera lando. Mi neniam pilotis aeroplanon; Beno kaj Georgo estis same senspertaj. Kiel en febra sonĝo niaj manoj serĉis butonon, kiu funkciigus la motoron. La motoro restis morta. Hodiaŭ mi scias, ke neniŭ estus forlasinta tiun aeroplanon, se ĝi estus estinta en bona ordo. Sed en tiu momento ni ne estis normalaj homoj. Ni trovis la aeroplanon en kampo, proksime al Lombartzijde, survoje al Dunkirko (Dunkerque), en tiu 28a de Majo de 1940, kiam la belga armeo kapitulis kaj la trupoj de Hitler rapide marŝis okcidenten. Kugloj kaj grenadoj fajfantaj super niaj kapoj memorigis nin, ke ni estis inter la batalfrontoj, en tiu regiono, kiu estis por kelkaj horoj "nenies lando". Mi estis unu el tiuj malsataj, lacaj, ĉifonvestitaj, sendefendaj aĉuloj, kiuj malespere atendis iun miraklon por saviĝi el la infero.

Neniŭ miraklo okazis pri la aeroplano. Senluziigite ni klopodis atingi la Ijzer-riveron. Britaj kaj francaj trupoj estis je la alia bordo, kaj unu ponto nedetruita ŝajnis promesi savon. La distanco al Dunkirko estis malpli ol 12 mejloj. Mi havis amikojn tie. Kiel ofte, survoje al Londono aŭ revenante de tie al Luksemburgo aŭ Parizo, mi estis tie, inter Esperantistoj! Mi estis farinta pa-

roladon en la bela domo de la Komerca Ĉambro, por la Dunkirka Esperanto-Societo. La prezidanto estis haveninĝeniero. Ni do iru al Dunkirko! Sed estis neeble atingi la ponton. Kugloj fajfis ĉirka niaj oreloj. Mi metis poŝtukon, kiu iam estis blanka, sur bastonon kaj diris al miaj kunuloj, ke ili iru kun mi alte sur la dunoj, tiel ke la trupoj vidu, ke ni venas kun amikaj intencoj. Sed la ratatat de maŝinpafilo elrevigis nin. Neeble! Kion fari? Ni komencis la vojon returne.

Ni havis neniun klaran ideon pri la milita situacio kaj ne sciis, ke en Dunkirko ni estus estintaj en muskaptilo. Eĉ ne ĉiuj soldatoj povis enŝipiĝi por iri al Anglujo. Mia Esperantista amiko, la haveninĝeniero, estis unu el la malmultaj nesoldatoj, kiuj sukcesis forveturi. Unu jaron poste mi revidis lin en Marseille, kaj ni interŝanĝis raportojn pri niaj aventuroj. . . .

Vespero venis. Ni estis lacaj. Ni ne timis bombojn kaj grenadojn. 18 tagoj da milito estis farintaj nin fatalistaj pri tiuj danĝeroj, de kiuj oni ne povas forkuri. Sed ni timis la maŝinpafilojn de la malalte flugantaj aeroplanoj, kiuj serĉadis iujn vivajn atakobjektojn. Kaŝu vin! Jetu vin teren! Defendo kontraŭ ili ne estas hazardo, sed arto — arto sennerviga kaj laciga.

Niaj nazoj flaris ion bonan.

Ĉu alia trompo kiel la aeroplano? Ne, tio estis veraodoro de supo, de viando, de io nepriskribebla bona por malplena stomako. Miraklo! Jen tuta soldatkuirejo, ega kaldrono kun supo entenanta viandon, terpomojn, rizon kaj fabojn. Kun raŭka krio ni atakis ĝin, prenante pecojn da viando en niajn manojn, trinkante el alumina soldatpelvo la supon, furioze maĉante fabojn kaj terpomojn kiel senanimaj bestoj malsategaj. La artileria fajro, kiu komencis plifortiĝi, kaj la bomboj, kiuj falis multnombre sur la regionon de la ponto, lasis nin indiferentaj. Francaj trupoj, kiuj estis rapideme retiriĝintaj trans la Ijzer-riveron, regalis nin per manĝo, kiun mi neniam forgesos.

En Middelkerke, vilaĝo de fiŝkaptistoj kaj, en "bonaj tempoj", de turistoj, ni vidis kandellumon en kafejo. Virino kun du infanoj estis en la kuirejo. "Ĉu vi havas ion por manĝi aŭ trinki?" demandis Beno. Ni ne estis vere malsataj, sed kion oni povis demandi por komenci konversacion? "Ni havas panon", diris la mastrino, "kaj — kelkajn botelojn da ruĝa vino".

Ni trinkis la vinon, penante forgesi la travivaĵojn de la tago. "Ĉu vi vidis la germanojn?" demandis timeme la mastrino. "Oni diras, ke ili estas en Bruĝo?" "Ne multajn, nur unu grupon da motorbiciklistoj!" "Kaj ĉu vi vidis la ŝipojn?" "Kiajn ŝipojn?" "Britaj militŝipoj estas tute proksimaj",

diris la virino. "Ili certe bombardos..." La marŝ-marŝ, de trupkolono aŭdiĝis de tute proksime. Silente la mastrino elblovis la kandelon. Tra la mallumo, stranga fajro brilis el la vino. Kiam la bruo de la prusaj botoj malproksimiĝis, Johano, kiu venis al nia grupeto dum la manĝado el la soldatkuirejo, levis sian glason kaj diris: "Vivu la morto!" Mi respondis: "Vivu la vivo!" La vorto estis la malo, la penso estis la sama.

La mastrino donis al ni la ŝlosilon de apuda domo, kies enloĝantoj estis forlasintaj la belgan marbordon. Ni dormis en litoj, bonaj, molaj litoj, sed la dormo ne daŭris longe. La britaj militŝipoj komencis bombardi la germanajn trupojn, kiuj antaŭeniris en la regiono, en kiu la belga armeo kapitulis. Ni do estis en vera triangulo de la morto. La triangulo estis formata de la Norda Maro, el kie pafis la britaj militŝipoj, la Ijzer-rivero, malantaŭ kiu la francoj kaj angloj uzis sian artilerion por protekti la enŝipigon de siaj trupoj, kaj la germanoj venantaj de Bruĝo. En la triangulo jam estis kelkaj germanaj patroloj, sed ankoraŭ ne solidaj trupmasoj.

Mi ne diros, ke mi estis sentima en tiu nokto, sed dank' al Dio nia grupeto restis viva kaj sana. Johano havis razilon — mia propra razilo kuŝis sur la fundo de la maro, en bombdetruita ŝipo en la haveno de Ostendo.

Ni razis kaj lavis nin kaj fariĝis iom pli homsimilaj. Por vivi aŭ por morti? Ni ne sciis. Sed la fakto ke la "bumbum" de la kanoj malpliĝis, donis esperon.

En la mateno ni daŭrigis nian piedvojaĝon, forlasante la marbordon. Ni baldaŭ estis inter tiuj centmiloj da belgoj, kiuj reiris al siaj domoj, aŭ al la ruinoj de tiuj domoj. Ni vidis la germanan armeon, kiu moviĝis al la marbordo kaj la Ijzer-rivero. Unu divizio post la alia. La infanterio estis konfiskinta biciklojn (en Belgujo preskaŭ ĉiu posedas biciklon). Trupoj, aŭtomobiloj, kanoj plenigis la ŝoseon. Ĉiu bombo ĵetita sur ĝin en tiuj horoj estus detruinta amason da militmaterialo. Sed eĉ ne unu brita aŭ franca aeroplano aperis. Oni rakontis strangajn historiojn pri mistera magneta forto, per kiu la germanoj detruis aeroplanojn kaj tankojn. La triumfo de la Nazi-tiranoj ŝajnis senfina.

La bela urbo Bruĝo, feliĉe ne detruita per bomboj, estis plena de germanaj trupoj. La vivo ankoraŭ ne estis tute adaptita al la novaj cirkonstancoj. "Vidu, jen via nomo!", Georgo alvokis min. En montrofenestro de librovendejo troviĝis, en bone videbla loko, la nederlanda eldono de unu el miaj libroj, forte kontraŭ-hitlera! Eble ankoraŭ iu aĉetos ĝin antaŭ ol la Gestapo venos. . . .

Post malmulte da tempo ni estis gastoj en Esperantista familio. La patro, la patrino kaj kvar

gefiloj estis Esperantistoj. La plej aĝa filo, Paŭlo, unu el miaj bonaj amikoj, estis aktiva en la Flandra Ligo Esperantista, kaj mi estis farinta paroladon en ĝia Bruĝa grupo, laŭ lia invito. La patro kaj la patrino, politike iom diferencaj de la gefiloj, estis membroj de la Reĝa Belga Ligo Esperantista kaj de ĝia tre granda Bruĝa grupo. Nun, en la uragano de la milito kaj en urbo ĵus invadita de malamika armeo, estis granda ĝojo por ni, havi amikan lokon, kie oni povis ricevi inteligentajn informojn anstataŭ la fantaziaj onidiroj, kiujn oni aŭdis ĉie. Ni interparolis Esperante kaj kelkfoje, pro miaj kunuloj, france, kaj ricevis multajn bonajn konsilojn. Paŭlo helpis nin trovi restojn por la nokto. Ni dormis sur pajlo en katolika lernejo, inter centoj da rifuĝintoj, kaj kompetenta flegistino prizorgis Johanon, kies piedoj aspektis kiel senformaj sangaj buloj. En la mateno ni havis bonan matenmanĝon ĉe la gastema familio Esperantista. Poste ni daŭrigis nian piedvojaĝon en la direkto al Bruselo kaj al nekonata estonteco. . . .

Kelkajn monatojn poste, kiam mi malespere serĉis eblecon eliri el Belgujo, mi ricevis poŝtkarton skribitan en Esperanto de Marie-Rose, filino de la Bruĝa familio. Ŝi diris: "Ni ofte pensas pri vi. Ni esperas, ke vi restos viva kaj sana kaj efektivigos viajn planojn". Du semajnojn poste mi estis ekster la belga landlimo.

# BRAZILA ESPERANTO-KONGRESO

DORIS T. CONNOR

Malgraŭ milita tempo, la agema Brazila Esperantistaro organizas grand-skalan Esperanto-Kongreson, okazonta en Aprilo 1945 en Rio-de-Janeiro. La Prezidanto de Brazilo, Getulio Vargas, akceptis esti la alta patrono de la Kongreso. La Honora kaj Protektanta Komitatoj estas kolekto de imponaj nomoj kaj titoloj kiuj respegulas la gravajn fakojn de la Brazila registaro kaj kultura vivo.

La Deka Brazila Kongreso estas en tre kapablaj manoj, inter kiuj estas la eminentaj kaj viglaj samideanoj: *D-ro A. Couto Fernandes*, ĝentila kaj senlaca Prezidanto de la Brazila Ligo Es-

perantista; *D-ro Carlos Domingues*, modesta sed diligenta Vic-Prezidanto de BLE; kaj *S-ro I. Gomes Braga*, fervora batalanto por nia afero.

Al la samideanoj en Nord-Ameriko, mi konsilas ke vi subtenu la Dekan Brazilan Kongreson de Esperanto. Montru al niaj tre efikaj kunlaborantoj en Brazilo ke vi aprobas ilian gravan laboron. Aliĝu al la Kongreso aŭ kiel *subtenanto* po \$2.50, aŭ kiel *simpla membro* po \$1.00. Vi ricevos ĉiujn eldonaĵojn de la Kongreso. Sendu vian kotizon rekte al Brazilo, aŭ pere de *Amerika Esperantisto* en Nov-Jorko.

---

## Seeds Before Harvest

When the war-news subsides in our daily papers, and international communications are reestablished, we can expect new interest in the Inter-language. The Membership Committee is getting ready to direct that new interest to Esperanto, and to help mobilize it for the local Esperanto clubs and societies.

To capitalize on this wave of interest, and to channelize it into a fruitful strengthening of our movement is the goal of the Membership Committee. In order that there may be an abundant harvest, we all are aware that there must first be plenty of good seeds. Your Membership Committee is now prepared to furnish those seeds in the form of concise, dignified and persuasive leaflets that present in convincing manner the merits of Esperanto. We urge our organizations and members to avail themselves of this stock of virile, inexpensive seeds. Let them be broadcast everywhere in America; let them find lodgement in fertile soil, where

the sunshine of interest and the rain of necessity will bring forth the buds.

Each of these effective leaflets will bear the address of some club or individual, so that when the seed sprouts, it may be nurtured and cultivated until the mature fruit appears. Then we can prevent the harvest from going astray. Then you can enlist the new adepts and mobilize them for the further spread of Esperanto.

Urge your organization to avail itself of this service. Canvass your membership and take up the matter in your next meeting. Determine how many hundreds or thousands of copies you can distribute efficiently, and send for your supply.

Tell us how many, and give us the correct name and address that should appear on the leaflets. Send \$1.00 for 200, or \$6.50 for each thousand copies. Sample copies mailed on request. *A. F. Doneis, Chairman,*  
*Membership Committee,*  
*Box 105, Pharr, Texas.*

# MALLONGA HISTORIO DE ESPERANTO

VERKITA DE ERNEST DODGE

(*Daŭrigo*)

*Redaktista Noto:* Ĉi tie troviĝas la dua el historia serio pri Esperanto, en kvar sinsekvaj partoj.



## TRIA PERIODO 1900-1907

---

La jaro 1900 signis por la nova lingvo kaj ideo komencon de multe pli rapida disvastigado. Dum tiama tutmonda foiro en Parizo staradis budo por montado de Esperantaĵoj, aranĝita de rusaj Esperantistoj. Pluraj eminentaj francoj, jam antaŭe interesitaj, komencis ekde tiam gvidadon de gravaj poresperantaj laboroj. Inter ili estis la nomoj Sebert, Lambert, Louis de Beaufront, Meray, Cart, kaj Bourlet, kune kun svisa profesoro, Privat, kaj belgoj, Moch kaj Lemaire. La pariza eldonisto, Hachette, entreprenis eldonadon de Esperantaj libroj. Dum tiu periodo ili aperigis multajn librojn.

Esperantistoj komencis pli ofte vojaĝadi alilanden kaj buŝe uzi Esperanton internacie. En 1905 okazis la unua internacia kongreso de Esperantistoj, kun 700 partoprenantoj el ĉiuj anguloj de Eŭropo. Tre ĝojiga okazo! D-ro Zamenhof parolis al entuziasma aŭskultantaro, kaj li solene eldiris la supermirinde belan "Preĝo sub la Verda Standardo."

Por garantiĝi al la lingvo stabilecon kaj ordigitan evoluon, oni

starigis Lingvan Komitaton, kiu tiam enhavis 95 spertulojn.

Ĝis tiam la pure literaturaj verkoj en Esperanto estis preskaŭ ĉiuj tradukaĵoj, kun nur malmultaj kaj mallongaj originalaj rakontoj. Fine en 1907 aperis la unua originala longa romano, "Kastelo de Prelongo."

Sed malantaŭ tiu eksteraĵo de tre kontentiga progreso, iu kaŝita agado, subtila kaj perfida je karaktero, estis sin preparanta por ataki la unuanimecon de la Esperantistaro. Tio eksplodis en 1907.



## KVARA PERIODO 1907-1914

---

Estas kuriza fakto ke, kvankam uzantoj de iu ajn nacia lingvo toleras kaj eĉ defendas en la gepatra lingvo plej grandajn malregulaĵojn, (ekzemple, "mouse, mice," "am, was, been," "good, better, best," "rain, rein, reign," "though, tough, cough, hiccough, plough, through"! ) ili tamen post lernado de artefarita lingvo tute simpla kaj sen malregulaĵoj ofte komencas kritiki la lingvon kaj imagi ke ili mem estus povintaj elpensi lingvon pli "perfektan." (Tio estas, pli konforman je siaj propraj preferoj, sed eble samtempe pli malkonforman je gustoj de multaj aliuloj.)

Ni jam rimarkis ke la unua lukto inter la ekzistanta Esperanto kaj la ŝanĝemuloj okazis en 1892-94; kaj la tiama demando estis decidita favore al la originala formo de la lingvo, per voĉdonado de la Esperantistoj. Tiun decidon la granda plimulto akceptis kaj trovis tute kontentiga. Sed restis pluraj malkontentuloj. Ili formis komploton por ŝanĝi la formon de la lingvo kaj doni al ĝi novan nomon, "Ido." La detaloj de la komploto estas multe tro longaj komplikitaj por tiu ĉi konciza historieto. Sed estas notinde, ke la proponantoj de la ŝanĝoj ne agadis malkaŝe kaj honeste. Ili agadis ruze kaj kaŝeme. Louis de Beaufront — antaŭe ŝajne fidela Esperantisto, kiun D-ro Zamenhof sendis al konferenco por anstataŭi sin mem kiel klariganton kaj propagandanton de Esperanto,—estis mem la aŭtoro (kune kun S-ro Couturat) de la "Idaj" ŝanĝproponoj, sed li ne konfesis tion ĝis la sekvanta jaro.

Tiuj malagrablaj okazintaĵoj komenciĝis en 1907. Ili okazigis ioman skismon en la vicoj de Esperantistoj. Sed, kvankam S-ro de Beaufront estis riĉulo, kaj kvankam tre multe da mono estis elspezita por propagandi Idon, (multe pli da mono ol Esperanto iam povis elspezi), Ido neniam gajnis grandan klientaron. Malgraŭ la "Idistiĝo" de pluraj antaŭaj gvidantoj de la Esperanto-movado, ne pli ol 5% de la Esperantistoj

fariĝis partianoj de la ŝanĝita lingvo.

Ĉar la nunaj pli novaj Esperantistoj ofte konas preskaŭ nenion pri Ido, krom ĝia nura nomo, estos oportune klarigi iomete la tiel nomatajn "plisimpligojn" de Esperanto, proponataj de la iamaj Idistoj. La gramatikon de l' substantivoj kaj adjektivoj ili en la komenco fakte plisimpligis (sed samtempe malriĉigis), forigante la akuzativon kaj la adjektivajn finaĵojn "aj", "an", "ajn". Sed samtempe la gramatikon de la verbo ili faris multe malpli simpla ol en Esperanto. Ĉar ili elpensis novajn formojn de la verbo. Ekzemple: "skribabas", (estas skribinta); "skribabos" (estos skribinta); "skribesas" (estas skribata), ktp. Ili komplikigis la personajn pronomojn diversmaniere; ekzemple, per uzo de tri formoj de la tria persono en pluralo. T.e., anstataŭ la Esperanta vorto "ili" la Idistoj havis tri vortojn, "ili, eli, oli", el kiuj "ili" signifis nur pluralon de virseksuloj, "eli" estis por inoj, kaj "oli" nur por aĵoj.

Kaj rimarkinde estas, ke la Idistoj, kiuj komencis agadon kiel ŝanĝemuloj kontraŭ Esperanto, baldaŭ montris sin ŝanĝemuloj inter si mem kaj ekdisputadis pri eblaj pluj ŝanĝoj,—ŝanĝon post ŝanĝo. Kvankam ili en komenco forigis pluralon de adjektivoj, ili baldaŭ renkontis oftan neceson por distingi la pluralon; do ili reinventis pluralan adjektivon, sed en du formoj, kun finaĵoj "i" kaj

“ai”. Ankaŭ ili adoptis “le” kiel pluralon de la artikolo “la”. Eĉ la akuzativon ili rekomencis ofte uzi.

Fine, la Idistoj ne estis kontentaj je la unuforma infinitivo, “skribi”, sed havis tri infinitivojn, nome “skribar” por nuntempo, “skribir” por pasinto, kaj “skribor” por futuro. Ili ankaŭ rompis la regulecon de l’ Esperanta akcento. Ĉar la tri infinitivoj havis akcenton sur la lastaj silaboj, — “ar”, “ir”, “or”. Kaj vortoj kiel ekzemple “familio” kaj “avenuo” havis akcenton sur la *dua* silabo antaŭ la lasta. Entute la pretendo de la Idistaj ŝaĝemuloj ke ili “plisimpligis” Esperanton estis iluzia kaj trompa.

Ido neniam havis uzantojn egalajn al eĉ 10% de la tiamaj Esperantistoj; kaj post la milito de 1914-18 ili havis preskaŭ neniujn. Tamen la brua diskutado de la tiamaj Idistoj kaŭzis dubon en multaj koroj pri la tuta interna-

cilingva movado. Ĝi estis grava frapo kaj portempe malrapidigis la disvastigon de Esperanto.

Sed spite ĉio, Esperanto ja progresis inter 1907 kaj 1914. Novaj kaj gravaj libroj eldoniĝis, novaj societoj fondiĝis en novaj landoj. Fondiĝis ankaŭ la Universala Esperanto-Asocio, per iniciativo de Hector Hodler, nelacigebla Sviso. La U.E.A. starigis en centoj da urboj ĉirkaŭ la mondo — pli poste en preskaŭ du mil — “delegitojn”, kiuj estis Esperantistoj pretaj servi samideanojn diversmaniere ĉu per korespondo aŭ dum vojaĝa vizito. S-ro Parrish, el Los Angeles, vizitis 25 eŭropajn landojn, propagandante la urbon Los Angeles per Esperantaj prelegoj — grava pruvo de la vivanteco de la lingvo. Kaj sukcese okazis ĉiujare la Universala Esperanto-Kongreso, kun elmontrado de entuziasmo kaj unueco.

(*Daŭrigota*)

## Soldatoj Lernas Esperanton en Italujo

La bela suno itala disradias sur ĉiun estaĵon. La lago ŝajnas trankvila, rebrilante ĉian figuraĵon kiel spegulo. La birdoj pepas kaj ĉirpas.

Ne estas facile konstrui bildon tian pri Italujo nun milite ŝirita. Ni pensu pri pacaj aferoj inter la nacioj — pri komuna lingvo inter la nacioj.

Mi estas unusola homo, sed tamen mi deziras plenumi mian respondecon kiel Esperantisto. Do, mi komencis varbi en mia kaj aliaj rotoj, kaj inter

unuopaj soldatoj. La “Ruĝa Kruco” donis al mi lernej-ĉambron, kaj dissendis anoncetojn pri nova klaso Esperanta. Tiu klaso nun funkcias tute kontentige. Ne havante lernolibron, mi mem verkis ĝin, kaj la lernantoj kopias en kajerojn. Por modelo mi uzas la Biblion.

Post kelkaj semajnoj la klaso finos la kurson, kaj tuj komenciĝos nova klaso, por fari pli da Esperantistoj.

— *Kaporalo Davido Jagerman*



## NEKROLOGO

EDWIN C. REED

La 31-an de Majo, 1944, mortis en Vaŝingtono, D. K., S-ro Edwin C. Reed, Esperanto-pioniro kaj kunfondinto de la Esperanto-movado en Usono. Li komencis sian laboron por Esperanto en Bostono en la jaro 1903, kaj partoprenis en la unua Usona Esperanto-kongreso en Chautauq, N.Y. Dum tiu kongreso li, kun aliaj Esperantistoj organizis la grupon "Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko". Li estis la unua sekretario de la Asocio kaj efike daŭrigis la eldonadon de la gazeto, "Amerika Esperantisto". Estis ankaŭ en Chautauqua kie li kaj la bonkonata Esperantistino, Ivy Kellerman, renkontiĝis. Poste la du geedziĝis kaj fariĝis vere Esperantista paro. S-ino Reed estas la aŭtoro de kelkaj tre famaj Esperanto-lernolibroj.

Kiam la Sesa Universala Kongreso de Esperanto okazis en Vaŝingtono en 1910, estis ili kiuj kapable prizorgis pri la multegaj laboroj kaj oficialaj klopodoj. Ĉe la Kvina Internacia Kongreso en Barcelono, Hispanujo, li oficiale reprezentis la Usonan registaron. Li kaj S-ino Reed gvidis la unuan grupon de Amerikaj Esperantistoj al la Sepa Kongreso en Antverpeno.

Post longa kaj senlaca laboro por Esperanto li fine retiriĝis de aktiva agado pro malsaneco. La lastan semajnon de la monato Majo ĉijare li suferis kormalsanon, post kio li neniam resaniĝis.

Nian kondolencon ni sendas al la edzino, Ivy Kellerman Reed, kaj al la filo, Erik Kellerman Reed, arkeologo ĉe la Nacia Park-Servo — nun en la armeo.

S-ro Roland W. Ruff, Route 2, Box 233, St. Albans, W. Va., baldaŭ eldonos pamfleton, "Pri Okcidenta Virginio", kiu priskribos la Statajn Parkojn. Poste sekvos tri aliaj eldonaĵoj. (Vidu anglan anoncon aliloke). S-ro Ruff konsilas jene: "Tiu pamfleto estos sendata senpage al Esperantistoj ĉie, post ricevo de leteropetanta ĝin. Sed ĉar mi devas prizorgi pri la enpoŝtigo mi petas de la Esperantistoj du helpojn — (a) Skribu leteron petante la pamfleton ne nur al mi, sed ankaŭ unu al la 'Editor, West Virginia Conservation, Charleston, W. Va.' kaj mi petas . . . skribu tute en Esperanto! (b) Enmetu en la leteron al mi, 3c poŝtmarkon por helpi al la elspezo pri la sendado de la pamfleto." Certe en tiu grava praktika propagando ĉiu Esperantisto helpos.

★ ★ ★

*Denaska Esperantisto Ernesto Kovary*, nun soldato en Francujo, estas filo de la fervora ĉekoslovaka samideanino *Irma Kovary*, nun loĝanta en Usono. Ŝi rakontas ke Ernesto lernis Esperanton kiel sia unua lingvo en la hejmo. En Francujo li nun loĝas sur la herbejo, kolektas agarikojn en la montoj, kaj kuiras ilin por si kaj la kunuloj. Li kaptas fiŝojn en la rivero kaj bakas ilin en oleo.

★ ★ ★

*Novaj Esperanto-klasoj*: Grava por nia afero estas la laboro de Esperanto-instruistoj. *F-ino Elsa Steinmetz, Sioux Falls, S. D.*, organizis sukcesplenan kurson enhavanta preskaŭ 25 personojn. Plejparte ili estas anoj de la "Klubo por Komercaj kaj Profesiaj Virinoj". — Alia bona novaĵo estas pri entuziasma Esperanto-klaso sub la gvidado de *S-ino Ruth H. Hart, Waterloo, N. Y.* — Kaj Esperanto-studrondo troviĝas bone organizita de la lojala esperantistino *S-ino Anna Kincaid, Portland, Oregon.*

## VERA ESPERANTISTO

Esperantujo bezonas verajn Esperantistojn same kiel diversaj nacioj bezonas verajn civitanojn.

Vera Esperantisto distingigas de la Duon-Esperantisto per sia amo kaj sindono al la movado.

Vera Esperantisto estas konvinkita idealisto.

Li perfekte scias la fundamenton de la lingvo kaj firme ĝin tenas kaj ne atentis la susurojn pri la reformo.

Li uzas Esperanton en ĉiuj okazoj. Li legas Esperantajn librojn kaj abonas Esperantajn gazetojn, oficialajn aŭ kulturajn. Li aliĝas al la Esperantaj organizoj kaj ĉeestas la kunvenojn kaj partoprenas Esperantajn kongresojn por praktiki la lingvon kaj progresigi la aferon. Li korespondas kun la samideanoj de aliaj landoj per Esperanto por akiri informojn utilajn kaj sciojn, kaj por kreskigi la fratecon kaj amikecon inter la samideanoj diverslandaj.

Vera Esperantisto neniam forgesas disvastigi la lingvon. Li parolas pri Esperanto dum la konversacioj kun amikoj. Li diskonigas Esperanton en la kluboj kaj asocioj kies membro li estas. Li verkas artikolojn pri Esperanto en la lokaj aŭ naciaj gazetoj, se li povas; li disdonas Esperantajn flugfoliojn kaj propagandilojn inter la konatuloj. Ĉiam kaj ĉie, li diligente kaj diskrete semas la ideon pri la mondlingvo.

Vera Esperantisto kondukas laŭ la spirito de la "interna ideo" de la Universala Harmonio kaj interpopola fratiĝo. Lia patriotismo Esperantista estas Homaranismo. Li ne celas propran profiton nek disputas pri la bagateloj. Li volonte oferas sian tempon, monon kaj energion al la movado. Kaj li kredas je la fina triumfo de Esperanto.

*Verkita de* PASTRO J. B. KAO  
*Julio 1944, Nov-Jorko*

---

## LA PICEOJ

*Charles Keeler*

Noktiĝas; la picarbar' silentas;  
Ĉe montorand' lunlumas; voĉoj gnome  
Susuras; plaŭdas riveret' fantome;  
Falanoptil' vok-voke jen lamentas.

Nun siajn kandletojn priatentas  
La Vestaj steloj. Blovas dolĉ-arome  
Kaj kantas ĥore zefirar'. Ĉiome,  
Ho nokto, vian benon mi korsentas.

Ĉar mi konstruis tie ĉi altanon,  
Branĉaron sonĝinvitan, de parfumo  
Incensa; pinoj ŝirmas la divanon  
Flustrantaj; brilas ĝi sub lunolumo.

Naturo estos gast' familiara.  
Sub Dia gard' mi dormos, nokto kara!

*Esperantigis Fred L. Wharff*

## ESPERANTO BOOKS

Uncertain transportation makes it difficult to get books from Europe or South America, and our orders are filled in small lots. If your order is not filled within 48 hours, it is because we are waiting for shipments.

PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO, Ivy Kellerman-Reed. A favorite all over the world for many years. For class or self-instruction	.75c
ESPERANTO HOME STUDENT, by James Robbie. Splendid for class or self-study. Pocket size and a favorite with the service men in camps	.25c
PRACTICAL ESPERANTO, by Wm. S. Benson. For self-instruction. It is unique with its 650 illustrations	.25c
UNIVERSALA ESPERANTO METODO, by Dr. Wm. S. Benson. This book is a wonder. "The only book of its kind in the world." 11,000 pictures. Two full-page tables of the pronunciation of the Esperanto alphabet in 36 languages. Correlatives in 35 languages. Complete index. 555 pages	\$4.00
AMERICAN POCKET DICTIONARY, by Carl Froding. 80 pages of Esperanto-English and English-Esperanto. An indispensable little pocket companion	.30c
ESTU PRETA, by George J. Falgier. A splendid <i>key</i> , with grammar, and considerable fundamental teaching	.10c
"LA ESPERO," Esperanto Song. Words and Music. Double sheet 8 x 11. Every Esperantist should have it. Sung at all Esperanto meetings	.15c or 2 for .25c
"LA VOJO." Esperanto Song. Single sheet. With translation.	.10c or 3 for .25c
EDINBURGH DICTIONARY. A world favorite. English-Esperanto and Esperanto-English. 288 pages	\$1.00
STEP BY STEP IN ESPERANTO, by M. C. Butler. One of the world's best.	
Cloth covers	\$1.00
DICTIONARIES. Just received, Millidge \$3.50,	Fulcher & Long \$2.50
STARS. No more of the metal stars, advertised in some text-books, due to priorities.	
INDIAN BEAD STARS, white bead background with green star in center	.45c
HOME STUDENT RECORDS—made in Europe. No more available.	
"LIFE OF ZAMENHOF" (English) \$1.00. "VIVO DE ZAMENHOF" (Esperanto)	\$1.25
"ESPERANTO INTERNACIA", by Ann E. Beatty. Over 300 hymns, original Esperanto and translations of well-known English hymns	.45c
"ESPERO" and "NAPOLAJ NOKTOJ". Songs on 10 in. Record	\$1.00

### YOUR MEMBERSHIP IN E. A. N. A. WILL BE APPRECIATED

Membership, with "American Esperantist". \$2.00 per year. And if you also wish membership in the International Esperanto League, with the *Jarlibro* (Yearbook Encyclopedia of Esperanto Activities), \$3.00. For the "Esperanto Internacia" (all-Esperanto official organ of I. E. L.) add \$1.00 to either of these memberships. Total for all above, \$4.00.

I..... Date.....

apply for membership in the Esperanto Association of North America, and enclose subscription (indicate class and amount) .....

.....

### ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

1410 H St., N. W., Washington, 5, D. C.

**ESPERANTISTAS HISPANICOS  
DE NUEVA YORK**

announce an

**ARTISTIC FESTIVAL**

and

**GRAND BALL**

---

**Casa Galicia de Unidad Gallega**

313 West 59th Street, New York City

**Sunday, November 19th**

Program at 5 p.m. — Dancing from 8 to 12

**MUSIC BY 'ORQUESTA A. TAIN'**

Authentic Spanish Dances, Music, Songs

**Dr. W. Solzbacher** Speaks in Spanish

---

**"All the Color and Verve of Old Spain"**

Staged by Modern Spanish Esperantists

Gentlemen \$1.00 — Ladies 75c

---

Information from

**FLOREAL CONCHADO**

**Esperantistas Hispánicos de Nueva York**

212 Clinton Street, Brooklyn 2, N. Y.

---

**Esperanto — for Interamerican & International Good Will**  
**WBYN broadcasts event in Spanish and Esperanto**  
**Week of November 12, 8-8:30 p.m.**